

NI ĈIUJ

INFORMILO PRI ESPERANTO

MEKSIKO, januaro 1983

Nº 1

En la “Enciklopedio de Esperanto”, Meksiklando meritis etan paragrafon de 47 alineojn. Eta? Komparu ĝin, ekzemple, kun tiu de Germanujo, kiu havas 960 alineojn.

En tiu mallonga referaĵo pri nia lando, estas la nomo de iu Vargas, fondinto de la revuo “La Meksika Lumturo” (1903). Tiu s-ro Vargas estas la sama –mi supozas– al kiu la 2an de majo de 1904, Zamenhof skribis esperante ke “la Meksika Societa Esperantista baldaŭ ricevos gloran nomon en la mondo esperantista”.

Kion ni havas post okdek jaroj de tiu pioniro? Multaj fortoj, multaj streboj kaj klopodoj, rimedo monaj kaj homaj perdiĝis dum tiu tempo. El ĉio, kio ĝis nun estis farita, restas preskaŭ nenio...

Sed ni lasu tiun pesimisman dorlotadon!

La celo de tiu ĉi modesta folieto estas informi pri la antaŭenigo de nia lingvo, ĉar celante la internacian lingvon, la informado estas baza ero de nia agado.

Ni konfesas ke nia ambicio estas kunigi ĉies fortojn por atingi nian komunan celon. Ni ankaŭ revas pri granda kaj grava revuo, kies ĝermo estus tiu ĉi informilo. Tamen, ni ne forgesu la vortojn de d-ro Zamenhof, kiu difinis la celon de ĉia agado jene: “Nia plej grava laboro devas esti ĉiam pligrandigi la nombron de la personoj kiuj ellernis nian lingvon.”

Al tiu plej grava laboro ni deziras kontribui.

AŬDITE, VIDITE, LEGITE

Malgranda internacia renkontiĝo esperantista okazis la 13an de januaro. Celante organizi radian esperanto-kurson, ok esperantistoj kunvenis ĉe kafejo Sanborn's por studi la eblecon tuj komenci kurson en Radio Universidad. S-ino Marta Tanguma, entuziasma komencantino oferis sian helpon por tion organizi. Tiel, estis decidite ke Inĝ. Figueroa kunordigos la surbendigon de la kurso, helpata de aliaj membroj. En la kunveno partoprenis ankaŭ s-ro Arias, s-ro Li (el Ĉinio), f-ino Breunninger (Germanio) kaj aliaj meksikaj esperantistoj. Ni esperu realigon kaj sukceson de tiu ĉi grava projekto.

Antaŭ kelkaj monatoj, grava malsano trafis s-ron Nájera, neobligante lin labori por ni afero. S-ro Nájero estas, jam de multaj jaroj, unu el la ĉefaj kolonoj sur kiuj apogiĝas la esperantomovado en nia lando. Ni forte bedaŭras tiun mankon, kaj plej sincere deziras baldaŭan resaniĝon al nia amiko.

Malgraŭ la malsano de la patro, familio Nájera daŭre laboras por esperanto. Jam de kelka tempo ili preparas televidfilmon por propagando kaj ankaŭ televidan kurson. Proprariske ili akiris la necesajn aparatojn por mem prepari la materialon. Ni atendas ties finpretigon por vidi propraokule kio rezultas el tio. Laŭ la penoj kaj laboro (kompreneble ankaŭ mono) investita en tia agado, ni rajtas esperi plej bonajn rezultojn.

Ĉiu informo, detalo, onidiro, klaĉo, helpo aŭ kritiko estos bonvenita de la redaktoro de tiu ĉi informilo. Kun ĉia ajn materialo oni sin turnu al Jorge Luis Gutiérrez. Pachuca 165-3, México 06140, DF. Telephone: 546-1373 (matene).

En la decembra numero de “Esperanto”, la redaktoro iel ripročas la kolombiajn samideanojn pro tio ke, ĝis nun, ankoraŭ ne aperas la esperanta traduko de “Cent Jaroj da Soleco”. Tamen, ni devas konsideri ke tia verko ne estas facile tradukebla, do, kiu kuraĝos tion fari? Eble pli facile estus komence traduki aliajn verkojn de la Nobel-premiito García Márquez, ekzemple la malgrandan romanon “Al la Kolonelo Neniu Skribas”, aŭ aliajn novelarojn.

Cetere, tio ĉi pensigas nin pri la stato de la latinamerika literaturo rilate la esperantan tradukon. Foliumente la katalogon de la libroservo de UEA, ni apenaŭ trovas kelkajn latinamerikajn verkojn. En “Esperanto en Perspektivo”, la sola meksika tradukaĵo estas “Kvin Poemoj el Pleno”, de Amado Nervo, aperinta en 1941. Kial avari a la internacia legantaro la verkojn de Paz, de Fuentes, de Rulfo, de Pacheco? Pro tio, kaj celante iam eldoni “Meksikan Antologion”, ni volas inviti ĉiujn interesitojn partopreni tradukrondon. Oni turnu sin al la redaktoro de tiu ĉi informilo.

Ĉiu kiu volas pagi sian kotizon al UEA por la kuranta jaro 1983, kontaktu s-ron Arias kiel eble plej baldaŭ. La kotizo estas du mil pesoj, sed eble iom altiĝos. Vi povas ankaŭ aldoni iomete pli por la sendokostoj.

“Mi faris por la afero ĉion, kion mi povis, kaj se ĉiu efektiva amiko de la lingvo internacia alportos al ĝi eĉ la centan parton de l’ moralaj kaj materiaj oferoj, kiujn mi al ĝi enportis tra dekdu jaroj ĝis hodiaŭ, tiam la afero iros bonege kaj venos a la celo post mallonga tempo. Na laboru kaj esperu!” Tion ĉi skribis Zamenhof en 1888. Do, li postulis nur centonon de dekdu karoj! Tio estas ne pli ol monato kaj duono. Kiu volas oferi tiom?

NI ĈIUJ

INFORMILO PRI ESPERANTO

NI ĈIUJ

INFORMILO PRI ESPERANTO

MEKSIKO, februaro 1983

Nº 2

La krizo atingis nin!

La situacio kiun travivas nia lando estas, tagon post tago, pli malfacila. La teruraj sekvoj de la ekonomia krizo ŝajnas nemezureblaj, kaj forta ondo de seniluziigo trakuras Meksikon. Kio okazas? El la plej simpla, eĉ naiva vidpunkto, la fakto estas ke mankas mono. La inflacio atingis dum la pasinta jaro la katastrofan nivelon de 100%, kaj neniu vidas la elirejon al tiu ĉi situacio.

Por ni, esperantistoj, kiuj estas forte ligitaj al eksterlando, tio tutsimple signifas preskaŭan neniigon de niaj rilatoj per esperanto. Aĉeti libron estas por ni sesoble pli koste ol pasintjare; vojaĝi al kongreso ŝajnas freneza utopio. Eĉ la kosto de la korespondado ankaŭ altiĝis. Kiel ni uzoz esperanton? Ĉu al ni restas nur revii pri la estonteco? Ĉu nura interbabilado ĉe ni? Kiel fronti la krizon?

Se mi bone memoras la grekaj etimojn, la vorto 'krizo' devenas de la greka 'krino', kiu signifas "mi decidas aŭ mi juĝas". Kriza tempo estas, do, tempo por decidi kaj juĝi. Ni devas decidi kion ni faros el tiu granda, viviga idealo kiu por ni reprezentas esperanto. Esperantismo estas io plu ol nura libro-legado aŭ kongresaj vojaĝoj. Ni devas peni trovi ĉe ni mem la necesajn fortojn, la taŭgajn rimedojn por atingi nian celon. Se ni bone organizas niajn kapabloj, ni certe travivos tiun ĉi krizon. "Ni dankas le venton, kaj repurigita, ni forton pli freŝan akiras. Ĉu vi memoras kiu diris tion?"

AŬDITE, VIDITE, LEGITE

La pasintan 14an de februaro, s-ino Tanguna kaj la redaktoro vizitis s-ron Miguel Carriedo, direktoron de Radio UNAM. Kiel ni anoncis en la pasinta bulteno, estos organizata radio-kurso de esperanto. Por ekinteresiĝi la aŭskultantaron, s-ro Carriedo proponis unue elsendi intervjuojn pri la internacia lingvo, kaj poste ekkomenci la kurson mem. Por la surbendigo de la kurso, familio Nájera afable proponis sian tutan ilaron kaj ejon, kiu cetere estas profesia aranĝata. Ni povas esperi grandan sukceson al tiu ĉi laboro.

Ni ricevis inviton partopreni la Poezian Konkurson "Internacia Amikeco 1983", organizita de Triesta Esperanto-Asocio. Ĉiu aŭtoro rajtas prezenti unu poemon ĝis la 31a de majo 1983. La adreso de la sidejo estas: Triesta Esperanto-Asocio, Via Trento 1, I 34123, Trieste, Italio,

Korespondemuloj! Se vi volas korespondi kun 12jara infano, skribu al Huszár Csaba; 24420 Kanjiža, Vojv. Putnika S, Jugoslavio.

S-ro Ángel Segura skribis al tiu ĉi bulteno, dezirante "ĝian sinsekvan kaj longdaŭran aperadon". Li sugestas ke ni invitu diversajn personojn partopreni la redaktadon de tiu ĉi informilo. Invito kiun ni kore etendas al ĉiuj interesiĝintoj diskonigi sian opinion pri nia movado. S-ro Segura ankaŭ reportas pri sia traduko de du noveloj de Juan Rulfo, kaj parto de la romano "Pedro Páramo", de la sama aŭtoro. Ni devas konfesi ke, por la traduk-rondo anoncita en la pasinta informilo, ni pensis ankaŭ pri tiu sama romano. Ni eĉ komencis ankaŭ traduki ĝin, ne sciante pri la laboro de s-ro Segura. Tamen, pro personaj aferoj neprokrastebaj, tiu tradukrondo povos ekfunkcii ekde venonta aprilo. Ĝis tiam, ni atendos aliajn respondojn.

NI ĈIUJ

INFORMILO PRI ESPERANTO

NI ĈIUJ

INFORMILO PRI ESPERANTO

MEKSIKO, marto 1983

Nº 3

Sed, kiu volas ŝanĝi?

En nia pasinta folio, mi parolis pri la krizo. Temis ĉefe pri la sekvoj de la krizo ĉe la esperantistoj. Sed, kial ni alfrontas krizon? Krizaj momentoj estiĝas kiam ĉe iu situacio aperas faktoro postulanta ŝanĝojn. Tiu faktoro, ĉe la meksika esperanto-movado, estas la urĝa bezono –pli kaj pli sentata– havi fortan organizaĵon. Ĝis nun, nia nura movado estis al poŝtofiĉejo por kontroli ĉu iu letero alvenis; aŭ senfrukta ĉetabla babilado; aŭ eterna disputado pro jam forgesitaj kialoj. Pli ol pri ‘movado’ ni devus paroli pri ‘stagnado’. La nomo de nia lingvo fariĝis ‘esperinto’.

Kiel ni festos la okdekjaran jubileon de esperanto en Meksikio? Kiaj nin renkontos la centjaran jubileon en 1987? Disigitaj? Elreviĝintaj? Ankoraŭ sopirantaj al pasintaj tempoj? Aŭ tutenergie kaj kunigite batalantaj? El tiu ĉi modesta parolejo, mi levas la plej sinceran inviton al organizado, al laborado, al kuniĝado.

“La afero vivos kaj konstante rememorigados pri si; post ĉiu nova silenta tempo, se ĝi eĉ daŭros dekon da jaroj, aperos nova revigliĝo; kiam laciĝos unuj batalantoj, aperos pli malpli frue novaj energiaj batalantoj, kaj tiel la afero iros tiel longe, ĝis fine ĝi atingos la celon.”

Freŝa akvo ĉiam troviĝas ĉe la fonto mem. Ni penu malŝtopi la fonton por ke la akvo fluu libere.

AŬDITE, VIDITE, LEGITE

Vi certe rimarkis nian silenton dum la pasinta monato. Pro personaj kaŭzoj, ni ne povis aperigi la informilon akurate. Do, la novaĵoj iom malnoviĝis kaj nun estas tute ekstertempa informi pri la elsendo kiun faris Radio Universidad antaŭ unu monato. Ĝi temis, fakte, pri ĝenerala prezentado de esperanto. Pli bone, ni informos kiam estos alia. Ĉar la respondeculo de la programo interesiĝis pri l'afero kaj ankaŭ pri eventuala kurso.

Ni ankaŭ informas pri longa artikolo verkita de D-ro González el Monterrey. Ĝi aperis en la kultura suplemento de 'El Porvenir', tiea ĵurnalo. Pere de personaj travivaĵoj, D-ro González informas eble pli efike, ol per seka teoriumado. Verŝajne aliaj artikoloj sekvos. Ni gratulas la doktoron kaj dankas pro la alsendita ĵurnalo. Tia ekzemplo multobliĝu!

Dum la Internacia Libro-Foiro organizita de la Nacia Universitato, ni havis l'eblecon paroli kun la reprezentanto de Guozi Shudian, la ĉina eldonejo kiu, interalie, eldonas 'El Popola Ĉinio'. Niaj legantoj certe konas tiun ĉi belan kaj interesan revuon. La reprezentanto informis nin pri la eblecoj akiri multajn esperantajn eldonaĵojn, je tre favora prezo. Pri la revuo, ni devas aldoni ke ĝi estas sendata aerpoŝte, do ricevata tute regule. Kiu interesiĝas pri la libroj kaj la revuo, povas kontakti s-ron Enrique Lemus, en la telefono 651-2279. Li estas la peranto de 'El Popola Ĉinio' en Meksikio.

La tradukrondo pri kiu ni parolis en la pasintaj folioj, ekfunkcios tiun ĉi monaton. Ĉiuj interesiĝintoj, bonvolu peti informon al la redaktoro. Ni ree esprimas niajn plej sincerajn dankojn al ĉiuj kontibuantoj, pro la informoj, opinioj, aŭ ĉiu alia materialo por tiu ĉi informilo. Bonvenitaj estos ĉe: Jorge Luis Gutiérrez. Pachuca 165-3, México 06140, D.F. 553-2322 kaj 543 1373.

Por esti konsekvencaj kun niaj priorganizaj postuloj, ni ekstarigos komitaton por labori tiudirekten. La unua paŝo estos, kompreneble, unuigi kiom eble plej multe da esperantistoj. Sed ne nur listigi ilin kaj sendi al ili la informilon. Kion la movado bezonas estas esperantistoj pretaj kunlabori. Ĉiuj povas helpi laŭ siaj kapablo kaj povoj. Provizore (t.e., se alia pli bona maniero ne estas decidita) la komitato konsistas el kvar fakoj:

Instruado –vakas; Financoj –vakas; Kulturaj Aferoj –Enrique Lemus;
Informado –Jorge Luis Gutiérrez

Se vi deziras partopreni iun el tiuj fakoj (aŭ alian kiun vi proponos), volu vin turnu al la redakcio.



Deziras korespondi: 40jara oficisto, ĉiuj temoj, kolektas poŝtmarkojn pri flaŭro kaj faŭno, reklam-kalendaretojn. Pavel Polnický, Příkladná 150/VI., 290 01 Poděbrady, Ĉekoslovakio.

Gekomencantoj 10-15 jaraj volus korespondi kaj interŝanĝi diversajn objektojn. Skribu rekte al la supra adreso.

UEA-kotizoj: Atentu! Ekde la unua de aprilo 1983, la kotizo de UEA estos fikista en guldenoj. Tio signifas ke ni devas pagi laŭ la valida kurzo en la dato de la pago. Nuntempe, unu guldeno egalas 56.65 pesojn, kaj la kotizo de UEA estas 39.00 gld. Do, ni devas pagi 2,209.35 pesojn. Tio signifas ankaŭ ke, por ni, estas pli oportune pagi plej frue, por eviti altiĝon kaŭzitan de eventuala devalutiĝo. Krom tio, aldoniĝas la 750 pesoj postulataj de la banko, kiel transpagaj kostoj. La MEF, kiel peranto de UEA en Meksikio, devos do, fiksi regularon tiurilate. Tio estos anoncata en la venonta numero.

NI ĈIUJ

INFORMILO PRI ESPERANTO

NI ĈIUJ

INFORMILO PRI ESPERANTO

MEKSIKO, septembro 1984

N^o 4

Jen ni denove!

La longa silento niaflanke havas multajn kaŭzojn. Unu el ili estas la krizo, nia bone konata akompananto jam de pluraj jaroj. Ne pensu, tamen, ke tio sufiĉas por silentigi nin. Tute male, ĝi devus instigi nin agi kaj solvi la komplikan problemaron de la esperanto-movado en Meksikio.

Multaj el niaj problemoj fontas el tio ke, ĝis nun, esperanto estas nekonata fenomeno por la plimulto. Sed ne sufiĉas propagandi esperanton, ne sufiĉas ke multaj personoj “aŭdu” pri ĝi. Necesas ke ni oferi al ili, samtempe, la rimedon *kaj lerni kaj praktiki* la lingvon. Eĉ se esperanto estus devige instruata en la lernejoj (kiel okazis antaŭ dudek jaroj, ĉe la Universitato, al la lernanto de profesoro Oyarzábal), kion gajnus la movado, se tiuj lernintoj neniam praktikas la lingvon? La problemo, do, estas konservi la jam interesitajn personojn. Kion fari por ke ili ne foriru?

La respondo estas oferi al ili ion interesan, ion gravan, por ke ili vidu ke esperanto estas inda je siaj klopodoj. La esperanto-movado, kiel ĉiu alia socia fenomeno, konkuras por altiri al si la intereson de la personoj. Sed ĝi konkuras kontraŭ multaj aliaj! Ĉu tio kion ni ofertas estas pli alloga ol la televido? Ĉu ni rajtas esperi ke la homoj eliros el sia komforta domo, por kunsidi kaj preparoli la movadon? Kia homo estas tiu kiu, defiante la veteron eliros por ĉeesti kunsidon? Se la kunsido estas pli interesa ol la televido, ni rajtas esperi multajn. Sed se ni kunsidas por paroli banalaĵojn, aŭ por aŭdi disputojn, ni vane atendos novajn interesitojn. Ĉiukaze, laŭ nia vidpunkto, la esperanto-movado ofertas ion multe pli grava ol televido. Ĉu vi samopinias?

AŬDITE, VIDITE, LEGITE

Kongresintoj. La Vankuvera Kongreso estis salutita de nia Asocio, pere de s-ino Julie Regal, el San Miguel de Allende. Alia partoprenanto estis Jesús Nájera, kiu lastmomente decidis vojaĝi al Vankuvero.

“Lingvaj minoritatoj” estis la kongresa temo. Ĉu pro tio ke esperanto estas minoritata lingvo? Eble. Sed por la venonta kongreso, en Aŭgsburgo, Germanio, la temo estas: “Antikvo kaj moderno: kion ŝanĝi, kion konservi?” Eble oni traktos tie, finfine!, ĉu indas konservi aŭ ne la literon ĥo. Aŭ, ĉu oni reprenos la ĉijaran temon kaj estos priparolata la neceso konservi (aŭ ŝanĝi) la lingvajn minoritatojn? Kaj poste, en Pekino, kio estos la temo? Eble la LKK ankoraŭ ne scias. Sed se ni atingas la 1887an Kongreson en Varsovio –la Jubilean– eble ni povos aŭdi ion pri esperanto kaj ties movado. Fina demando: kio okazas al la kongresaj temoj? Kial ili ne estas ligitaj de unu jaro a la sekvonta? En kiu forgesita tirkesto ŝimas la gravaj paroladoj pri la kongresas temoj?

Foririnto. Fine de la pasinta julio, forvojaĝis s-ano Li Weilun al sia lando, Ĉinio. Li pasigis ĉe ni preskaŭ du jarojn, kiujn li profitis por aktivi en la movado: li donis kurson en la Societo de Amikeco kun Ĉinio, krom verki lernolibron, legolibron kaj novelon. Li lasis ĉi tie bonajn geamikojn kaj rememorojn. Bonan vojaĝon!

Tradukinto. Antaŭ kelkaj semajnoj, Ángel Segura Peralta, prezidanto de la Asocio, finis la tradukadon de *Pedro Páramo*, mondkonata romano de Juan Rulfo, unu el la plej elstaraj verkistoj de Meksikio. Kiu iam legis la romanon, povos imagi la laboron kiun la traduko reprezentas. Certe ne temas pri simpla hispana lingvaĵo, sed pri tre karakteriza meksika parolmaniero. Gratulon al nia s-ano kaj sukceson en la eldonado!

Libroservo. Ángel Luna Cárdenas, kiu ekde tiu ĉi jaro funkcias ankaŭ kiel delegito por Meksiko, prenis sur sin la respondecon de la libroservo. Ĉe li oni povas aĉeti: Plena Gramatiko de Esperanto [48 gld], Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto [130 gld], krom la eldonaĵoj de El Popola Ĉinio. Kontaktu lin tuj! (Tel. 564 0546)

Orwell kaj esperanto en 1984

George Orwell estas vaste priparolata dum tiu ĉi jaro. Tio estas pro tio ke, unu el siaj plej konataj romanoj estas titolita precize *Mil Naŭcent Okdek Kvar*. Kiu ankoraŭ ne legas pri ĝi? Tiu romano ne estas scienc-fikcio propre dirite, sed “soci-fikcio”, ĉar en ĝi la emfazo estas multe pli sur la socia sistemo, ol sur la scienc-teknika aspekto. La aperjaro de la libro estis 1949, kaj ĝi priskribas las situacion en kiu la mondo sin trovas 35 jarojn poste. Ni lasas al la leganto la plezuron malkovri ĉu li pravis aŭ ne.

Sed estas iu nemulte konata aspekto, nome, la rilato kiun Orwell havis al esperanto kaj al aliaj planlingvoj. Orwell estis nevo de Ellen Kate Limouzin, la fidela kunulino de Eŭgenio Lanti. Kiam Orwell vizitis Parizon, li pasigis multajn vesperojn ĉe sia onklino, parolante kaj diskutante kun la fondinto de SAT. Pri esperanto kompreneble ili ankaŭ parolis. Orwell konis ankaŭ “Basic English” de C.K. Ogden, kiel pruvas lastatempe malkovritajn skribaĵoj de Orwell mem, destinitaj al aŭtoro de “Basic”. Ŝajne, Orwell malaprobis la ideon de Ogden.

Sed lia kono pri planlingvoj montriĝas en *Mil Naŭcent Okdek Kvar*. En tiu romano, la brita verkisto priskribas iun “newspeak” (novparolon), kiu permesas al la registaro manipuli la informojn kaj eĉ la penson de la popolo.

Ĉu Orwell malkonfidis la sekvon de iu ĝenerale enkondukita internacia lingvo? Jes, eble li pensis ke tio servus pli al la registaroj por kontroli la popolojn, ol al la popoloj por kleriĝi kaj havi kontaktojn trans la lingvaj baroj. Tial li mokas la tutan aferon en sia romano, pere de tiu ‘novparolo’. Multaj el la antaŭjuĝoj kaj atakoj kontraŭ esperanto devenas el tiu sama penso. Do, la demando estas: ĉu esperanto devas esti je la servo de la registaro en la manipulado de la pensoj; aŭ male, helpi la popolojn malkatenigi la menson de la unuflanka informado? Ĉu esti aŭ ne esti? Jen la demando!

NI ĈIUJ

INFORMILO PRI ESPERANTO